Aperas almenaŭ 8-paĝa kun 4-paĝa aldono „2. Sprache für Alle“ la 5. de l' monato.

Leteradreso:
Wien, I., Neue Burg,
Telefono R-27-803

Manuskriptoj
nur resendotaj kontraŭ reafranko.

Aŭstria Esperantisto

Jarabono
komencebla ĉiumonate
por Aŭstria S 4.60,
pagebla ankaŭ en part-pagoj (½ j. S 2.35),
aliaj landoj svfr. 4.25
(9 poŝtrespondkuponoj)
Ponumere 45 g (1 prk).

Poŝtŝparkaso-konto
aŭstria D 123.826.

Oficiala organo de Internacia Esperanto-Muzeo, Aŭstria Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio

Ne ĝustatempa malmendo de nia gazeto devigas al plupago de la jarkotizo por la sekvonta jaro.

N-ro 11 (148) Korneuburg ĉe Wien, la 5. novembro 1937. 14. jaro

Kien por vintrosporti?

Kompreneble al Aŭstrio!

Kial?

Ĉar ekzistas ĉiu sportebleco,
ĉar vi vivas malmultekoste,
ĉar vi sentos vin hejme če ni!

Do venu!

Ĉiujn informojn donas **„Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio“**, Wien, I., Neue Burg, Aŭstrio.



Kablofervojo al sur Schmittenhöhe.

Skio-lifto.

Por agrabligi al la skikurantoj la reiron al la elirpunkto post skikurado valen oni nun konstruas apartajn skiliftojn. La skianto simple ekkaptas tenilon sur kablo, kiu tiras lin al la elirpunkto.

En Aŭstrio la unua tia instalaĵo estas nun konstruata en Zürs kaj ĝi tiros la sportulojn en 400 m longo 140 m alten al Hasenscharte.

La nova Aŭstrio.

De **George S. Messersmith**, iama ambasadoro kaj komisiita ministro de Unuiĝintaj Ŝtatoj de Nordameriko en Wien.

(Laŭ parolado de la ministro farita antaŭ granda publiko en Komerca Ĉambro de New York en printempo 1937.)

En la larĝaj tavoloj de la pensanta enloĝantaro en Unuiĝintaj Ŝtatoj de Nordameriko kreskas la kompreno, ke estus unu el la plej grandaj eraroj, se ni opinius resti netuŝitaj de la okazintaĵoj ekster niaj limoj. Kelktempe pro la internaj propraj zorgoj ĉi tiu politiko de neintereso ekzistis, ĉar oni pensis, ke la okazaĵoj en aliaj partoj de la mondo nin tuŝas nur nerekte. Sed, se mi parolas ĉi tie nur kiel privata homo kaj je mia propra respondeco, mi tamen devas fiksi la fakton, ke ni same kiel la aliaj ŝtatoj tre forte estas interesataj, ke ordigitaj ekonomiaj kaj politikaj cirkonstancoj regu en tutmondo.

Se nia intereso por aliaj partoj en la mondo estas rajtigita, tio speciale estas por Aŭstrio, kie mi havas la honoron reprezenti la Unuiĝintajn Ŝtatojn. Kiam mi venis antaŭ 3 jaroj en ĉi tiun landon, ankaŭ mi apartenis al la dubemuloj, kiuj havis la ideon, ke ĉi tiu malgranda lando nur povos vivi per konstanta helpo de ekstero. Sed mi povis konvinkiĝi, ke Aŭstrio kapablis fari malgraŭ la plej grandaj malfacilaĵoj decidajn progresojn en la direkto al la rekonstruo. Kaj nun praktike ne ekzistas spertulo pri la situacio en Mezeŭropo, kiu ne estus konvinkita, ke dum normala tempo kaj če normalaj rilatoj al ĉiuj najbaraj ŝtatoj Aŭstrio povas esti en siaj nunaj limoj nepre prosperanta ŝtato.

Mi ne volas vin ŝarĝi per ciferoj, sed deziras konstati, ke Aŭstrio povis preskaŭ tute egaligi sian deficiton en la komercbilanco de 295 milionoj ŝilingoj per la enspezoj el fremdultrafiko (185 milionoj), el transit-trafiko kaj -komerco (80 m.) kaj eksporto de elektra fluo (18 m). La ŝtatfinancoj kaj la valuto estas ordigitaj, sed speciale akcentinda estas la nesufiĉe rekonata ŝuldo-pagvolo de Aŭstrio. Aŭstrio estas unu el la tre malmultaj landoj, kiu plene pagis la internajn kaj eksterlandajn ŝuldojn kaj ankaŭ daŭrigas la libervolan transpagon de kapitalo kaj procentoj al la eksterlando.

Mi tial opinias, ke vi konsentos, ke nur estas en la intereso de racio kaj de bona financpolitiko, subteni la rentoreduktodezirojn de la aŭstria registaro por tiuj pruntepreno j, kiuj ankoraŭ havas tro altan renton, ĉar tio koncernas pruntepreninton, kiu montris specialan kontraktfidelecon kaj honestecon en ĉiuj siaj promesdevigoj dum la plej malfacila tempo. Eble neniu lando en Eŭropo estus povinta pli facile eluzi la simpatiojn en la eksterlando al tio, atingi malaltigojn de la ŝuldoj, sed Aŭstrio neŝanceleble refutis, eluzi ĉi tiujn bonŝancojn. La kontrolo de Ligo de Nacioj super Aŭstrio jam en la pasinta jaro povis ĉesi. Speciale mi deziras mencii ankoraŭ la klopodojn de Aŭstrio pro la konsolidiĝo de sia valuto. Malgraŭ malvalorigoj en la najbarŝtatoj ĉi tiu malgranda lando konservis sian monvaloron neŝanĝita, kaj ĉi tiu fakto estas konsiderata kiel la plej fundamenta paŝo al la ekonomia rekonstruo. Vidinte la politikan kaj ekonomian malfacilaĵojn en Eŭropo dum la lastaj jaroj kaj la pesimismon, kiun oni montris rilate al la evoluo en Malnova Mondo, estas speciale kuraĝiga, ke ĉi tiu malgranda Aŭstrio kapablis fari esperigan kaj kontentigan evoluon. Ĉar la historio de Aŭstrio dum la lastaj jaroj estas nepra pruvo por tio, ke ni povas kalkuli dum normala tempo je reveno al ĝenerala prospero kaj reala plibonigo en Eŭropo, kiam en tiom malcerta tempo kaj sub tiel grandaj malfacilaĵoj tia bona evoluo estis ebla en tiom malgranda lando. Ĉi tiu espero ankoraŭ estas subtenata per tio, ke ankaŭ en la najbarŝtatoj de Aŭstrio la ĝenerala tendenco montriĝas kuraĝiga. Oni jam povas observi kreskantan kunlaboron inter ĉi tiuj ŝtatoj, kiuj ĉefe celas malgrandiĝon de la ekonomia premo, per kio aliaj delikataj problemoj, kiel ekzemple tiu de la limrevizio, vidiĝas malpli gravaj. En ĉi tiu kontakto ankaŭ la fakto estas multsignifa, ke la aŭstria registaro ripete deklaris, ke ĝi deziras vivi kun ĉiuj najbaroj en paco

kaj nenion entrepreni, kio povus malhelpi ... internan ordon aŭ la pacon de Eŭropo. ... Aŭstrio povis aranĝi la plej amikajn rilatojn al ĉiuj najbaroj kaj ankaŭ konservi en kunlaboro kun Ligo de Nacioj.

(El „Zeitschau" de „Heimatdienst"-Wien.)

Esperantista Lingva Komitato. Akademio.

Haag, Nederlando, Oostduinlaan 32.

1. Elekto de membroj de LK.: Reelektitaj post finiĝo de sia naŭjara funkciperiodo Baghy, Belmont, Bofill, Drezen, Ghezzo, Mučnik kaj Uitterdijk.

2. Elekto de membroj de Akademio: Baghy, Belmont, Cseh, Grau Casas, Minor. Schmid, Waringhien.

3. Elekto de la Estraro de LK.: Prez. inĝ Isbrücker, vicprez. Baghy kaj Grau Casas; dir. de Sekcio „Komuna Vortaro": W. Bailey; dir. de Sekcio „Gramatiko": provizore P. Cseh ĝis d-ro Lippmann povos reokupi sian postenon; dir. de Sekcio „Teknikaj Vortaroj": Helleboid; dir. de Sekcio „Kontrolo": Rollet de L'Isle.

4. Estontaj elektoj. Ĉar LK decidis, ke la nombro ne superu 100 kaj ĝi nun estas 107, neniu nova kandidato estas prezentata.

La prez. de LK: Ir. I. R. G. Isbrücker.

Rondo de veteranoj de Esperanto.

La esperantistoj, aliĝintaj al la E.-movado antaŭ la I-a Kongreso 1905, ricevis dum la Jubileo-Kongreso en Varsovio „oran stelon" kaj la aliĝintoj antaŭ la Krakova Kongreso en 1912 la „arĝentan stelon". Tiuj, kiuj ne ankoraŭ ricevis ilin, anoncu sin ĝis plej malfue 15. nov. (eŭropanoj) kaj ĝis 15. dec. (alikontinentanoj), aldonante precizajn nomon, antaŭnomon, adreson kaj jaron de aliĝo kaj samtempe pagante 2 Zlotojn (kongresintoj) kaj 4 Zl., kiuj ne aliĝis al la Jubileo, por kovro de la elspezoj por la steloj kaj krome Zl. 1.30 por enskribita alsendo de stelo kaj diplomo.

Dum la Jubileo aperis la projekto pri fondo de internacia „Rondo de Veteranoj de Esperanto", grupiĝanta esperantistojn de antaŭ ĝis aŭgusto 1912 kaj celanta per plifaciligo de interrilatoj de la membroj kreskigon inter ili de la fortika sento de solidareco por eventuala kreo por ili de servaro de reciproka morala kaj materiala divers-speca helpo.

Veteranoj dezirantaj kunfondi kaj aliĝi al ĉi tiu rondo, skribu al la suba adreso kaj enpagu la enirkotizon de Zl. 1.50 por la unuaj korespondelspezoj.

J. Litauer, sekr. de Komisiono de la Jubilea Stelo, Warszawa, Marszalkowska 81.

30-a Univ. Kongreso de Esperanto.

Adreso: Heronsgate, Rickmansworth, Herts, Anglujo.

Kotizo ĝis fino de 1937 anglaj ŝ 20, poste la kotizo estos plialtigata.

Aliĝis ĝis nun jam 189 samideanoj.

Ni esperas, ke ĉi tiu kongreso fariĝos tre granda.

Suplemento

al la I. E. L.-Jaribro 1937.

IEL plenumis sian promeson, donitan dum la Jubileo-Kongreso en Varsovio, eldoni ankoraŭ en oktobro „Suplementon". Ĝi aperis 36-paĝa kun multaj novaj aliĝintaj Landaj Asocioj, ĉefdelegitoj kaj perantoj kaj grandaro de delegitoj. Enestas ankaŭ la Statuto de IEL, kies studadon ni rekomendas al ĉiu samideano, kio faciligas la laboron de IEL.

Ni kore gratulas pro la rapida eldono! En 1937 jam en marto la jarlibro kaj krome Suplemento! Tio parolas por si mem kaj montras la viglecon de IEL kaj la konfidon de la samideanaro!

Jubilea Jarlibro de la E.-movado 1937.

Eldonita de Univ. E.-Asocio en Genève.

La enhavo estas tre interesa, sed la unuopaj ĉapitroj ne kompletaj: Kalendaro, parolado de Hodler 1909 en Genève, La lingvo Esperanto, Bibliografiaj verkoj, Resuma Historio de la E.-movado, La internacia Organizo Esp., La Esperantista Panteono, Literaturo 1887—1937, Faka-Scienca-Teknika Vortaro, Universala Silosilaro, interŝtata E.-Akordo pri la enkonduko de E. en la lernejojn, Datoj de UEA., Ĉefdelegitoj kaj pagejoj (sed ne delegitoj), Honora Membraro, Dumviva Membraro, Lingva Komitato kaj Akademio, Polujo la lando de la Jubilea Kongreso.

La libro enhavas historiajn interesajojn, sed ne delegitojn, ĉar „granda nombro de deleg. de UEA. aŭ transiris al ligo de landaj asocioj, sekve de informoj malveraj pri morto de UEA., aŭ indiferentiĝis pri ĉio".

La libreto 240-paĝa en ora kovrilo estas presita en la naskiĝurbo de d-ro Zamenhof en Bialystok. La papero kaj la preso ne estas bonaj.

Tutmondo Kongreso de IKUE 1938.

Nia XX-a okazos venontjare de 23. ĝis 29. julio en fama jugoslava urbo Ljubljana. Sub prezido de s-ro Golobiĉ Peter jam funkcias Kongresa Komitato. Nia oficiala organo Espero Katolika kaj Niaj Vizaĝoj, kies redaktoro estas konata slovena verkisto Damjan Vahen, raportos pri la XX-a. Informojn ĉe Damjan Vahen, Ljubljana, Reslova 29, Jugoslavujo. Pri IKUE informas Aleŝ Berka, ĝen. sekr.-kas. de IKUE kaj administranto de Espero Katolika, Brno, V jirchářích 9. ČSR.

Moderna metodo kontraŭ Esperanto.

La 8. de dec. la E.-societo „Albatro" en Varna fariĝis objekto de barbara atenco. Nekonataj elementoj dum la nokto ĵetis bombojn kontraŭ la klubejon, kaŭzante domaĝojn. La atencintoj restis ĝis nun nekaptitaj.

(Laŭ Bulgara Esp.-Sofia)

La leĝo de la severeco.

De August Hochreimer, Linz.

(Premiita de la Internaciaj Floraj Ludoj.)

Mi estis elirinta antaŭ tagiĝo. Mi staris en la kanaro kaj rigardis trans la malsekan herbejan ebenon, kiel mi faris ĉiam, antaŭ ol mi iris el la kovrejo. Nenio estis videbla. Nur falko ŝvebis en la aero. Subite estis ekstere moviĝo kaj mi vidis malaltan ruĝan beston kurantan trans la liberan spacon: vulpo, kiu portis kaptaĵon en la dentaro.

Kio okazis, estis pli rapide ol mi povis pensi: pli frue ĝi estis nur kiel larĝa malhela strio, kiu staris super la vulpo en la aero. Mi aŭdis obtuzan bruadon kvazaŭ enirus subita ventopuŝo malproksimajn suprojn de arboj. Grandega birdo estis falinta malsupren el la alteco. La vulpo deflankiĝis, ŝanceliĝante pro ektimego kaj la aera premo kaj faligis sian kaptaĵon. La puŝo maltrafis. Fulmrapide altiĝis la akra dentaro de la vulpo kontraŭ la aglo kiel pikanta glavo. Sed tiu leviĝis ĵus ree kun obtuza bato de la flugiloj kaj la vulpo ekkaptis nur kelkajn plumojn el la brusto de l' kontraŭulo. Ĝi resaltas per la tuta forto al tiu arbusto, malproksima nur kelkajn paŝojn, kiu donas sekurigan kovrejon. Tiam ĝin superestas ree la „potenculo", jetas ĝin flanken per flugila bato tiel, ke la vulpo rulas trans la gruzan ŝtonaron kaj ĝia blanka dentaro tintas kaptante aeron. Antaŭ ol ĝi povas leviĝi, premegis ĝin la aglo, staras sur ĝi kaj forte remas per la flugiloj, por sin teni en la ekvilibro.

Kiel vermo tordas sin la vulpo, muta, por sin savi el la teruraj manoj. Sed tio estis ŝajne senfrukta. Unu de la gigantaj manegoj ekprenis la bruston de la vulpo sed la alia ĉirkaŭprenas fere la kapon kaj la malsupran makzelon tiel, ke la vulpo ne povas plu mordi kaj unu el la tranĉilakraj „armiloj" malleviĝis en la okulojn. Blindigita estis la viktimo kaj sendefenda.

Nun leviĝis la aglo kaj flugas kelkajn paŝojn malalte super la tero. Sed ankoraŭ estis tro multe da vivo en la viktimo. Subite ektordas sin la vulpo kaj batas per la piedoj en la aeron, ĝi kuntiras tremante la korpon kaj streĉas sin. Tio estis nenio por la aglo. Ĝi malleviĝas sur la teron, nur kelkajn paŝojn antaŭ mi. Longe ĝi staras kun malfermitaj flugiloj, sin balancante, apogante sur la vosto kaj la flugiloj. Daŭre ĉirkaŭas la ungegoj fere la vulpon, kiu sin tenas longe senmova, poste ree ĝi tremas senespere kaj batas per la vosto. Malhela sango fluas el multaj vundoj kaj kolorigas la herbon. Nun ĝi streĉas la piedojn rigide de si. Nun finis ĝia vivo, mi pensis. Sed nun venis, kio estis terura kaj kuntiris mian koron konvulsie en la brusto. Neniam mi forgesos tion.

La vulpo kriis.

Mi aŭdis la vulpojn kverelantajn, kiam ili en la pariĝema tempo kuris malantaŭ la inoj kaj interbatiĝis je ili. Mi aŭdis, kiel ili krietantaj persekutis arde deziratan kaptaĵon. Mi ankaŭ aŭdis, kiel ili en la mallumaj malvarmaj noktoj hurlis longe kaj kvereleme. Sed neniam pli frue mi aŭdis vulpon tiel terure kvereli kiel tiun ĉi.

Mi scias, ke la vulpo preskaŭ neniam kverelas pro doloro aŭ timo. Longajn horojn ĝi suferas torturita en la terura fero sen ia krieto. Mute ĝi rigardas la homon venantan kaj kuraĝe ĝi suferas la morton sen kverelo.

Sed tiu ĉi vulpo kriis. Estis obtuza kverelanta sono el morte vundita, konvulsiita brusto, el buŝo, kiu fere estis fermita de la mortiga; ne estis laŭta sed turmentita kaj turmentanta, premita kaj terura kverelema krio.

La vulpo kriis.

La aglo ne ellasis la kapon el la ungego. Sed ĝi eligis la ungojn batitajn en la bruston kaj enigis ilin apude, kuntiris ilin kiel pugnon, liberigis ilin ree kaj enigis ilin ankoraŭfoje kaj ree. El dek novaj vundoj fluis sango.

Mi sidetis en la kanaro kun obtuza premo en la kapo. Mia koro batis rapide kaj la ŝvito staris sur mia frunto. La suno leviĝis super la kanaro kaj la vulpo ĉiam ankoraŭ vivis. Ĝi ne kriis plu; ĝi ne kriis plu, mi pensis.

Interŝanĝaj karavanoj inter Danujo kaj Nederlando. S-anoj Grönborg en Rißkov kaj Kat en Leeuwarden ankaŭ ĉisomere aranĝis malmultekostajn karavanojn. 33 danoj kaj 33 nederlandanoj faris la reciprokan viziton per aŭtobusoj.

Vidantoj helpu niajn nevidantajn samideanojn!

La nelacigebla organizanto de „Universala Asocio de Blindul-Organizaĵoj", Harald Thilander en Stocksund, Svedujo, invitas al abono de „Ligilo por Vidantoj", bela multilustrata organo de la Blindula Asocio, por helpi per tio al la Asocio. La abonprezo por 2 duoblaj aŭ poste 4 simplaj numeroj ĉiujare estas 1 sveda Krono aŭ egalvaloro.

Ni helpu niajn blindajn samideanojn!

Lydia Zamenhof en Ameriko.

Lydia Zamenhof, la filino de nia majstro, kiu dum kelkaj jaroj instruis E-on en Francujo, la 20. de septembro veturis al Ameriko, kie ŝi faros prelegojn en la organizaĵoj de la Bahaa-movado kaj gvidos E.-kursojn.

Ni deziras al ŝi plenan sukceson!

Esperanto-monumento.

De s-ano J. F. C. M. Dercks ni ricevas la foton pri la bela Esperanto-monumento en Bergen-op-Zoom en Nederlando.

Portretkartoj de Zamenhof.

Giovanni della Savia, Udine (S. Rocco), Via della Valle N. 12/7 eldonis tiajn kartojn en 4 koloroj kaj serion de 15 diverskoloraj sigelmarkoj.

Harald Thilander la 25. de oktobro fariĝis 60-jara. Dum 37 jaroj li fervore laboregis, por doni al la blinduloj la konsolon de Esperanto. La Estraro de Int. E.-Ligo en Heronsgate skribe gratulis al la jubileanto.

Internacia Esperanto-Muzeo kaj nia gazeto kun granda plezuro aliĝas al la gratuloj!

Kiu estas tiu?

Samideano Agourtine, ĵurnalisto el Paris, kiu deziris esti arestata de la du kunfotografitaj samideaninoj-policistoj dum la Kongreso en Varsovio.

Antaŭ la Universala Kongreso okazis kurso kun policistoj, en kiu ankaŭ tiuj du simpatiaj samideaninoj partoprenis.

50-a datreveno de geedziĝfesto.

Nia samideano **d-ro Wilhelm E. Dietl,** kolonelkuracisto emer. en Baden ĉe Wien, Aŭstrio, longjara samideano, kiu jam vizitis la kongreson en Barcelona, en bona sanstato la 30. de oktobro festis kun sia edzino la 50-an datrevenon de sia geedziĝfesto.

Ni deziras bonan sanon kaj ankoraŭ longan vivon al la jubilea paro.

IEMW, E.-Klubo Wien, Aŭstria Esperantisto: Steiner.

El Egiptujo.

Originala raporto de N. Mahrus-Fajum.

S-ro Nasif Kahrus, del. de IEL, kaj prez. de E.-Grupo de Fajum sendis telegramon al lia Reĝa Moŝto okaze de lia kronado kaj ricevis telegram-respondon. Jen la telegramoj:

„Ekscelenco la ĉefoficisto de lia Reĝa Moŝto! — Bonvolu prezenti al lia reĝa Moŝto en la nomo de la esperantistoj kaj de mi mem la plej sincerajn bondezirojn okaze de lia kronado."

„Al s-ro N. Mahrus, prezidanto de Esperanto-Grupo de Fajum. — Ni havas la honoron prezenti al vi la altan dankon por viaj bondeziroj kaj gratuloj, per kiaj vi esprimis vian sincerecon okaze de la kronado de nia reĝo moŝto. Abdin, reĝa palaco, ĉefoficisto."

Komence de la somera libertempo kunvenis kelkaj egiptaj esperantistoj en Kairo. Ili propagandis E-on, skribinte gravan artikolon arablingve en fama gazeto pri la jubilea kongreso.

La konata germana mondvojaĝinto Edmund Zscheile el Leipzig vizitas kun sia edzino Egiptujon kaj estas mia gasto. Traveturinte Aŭstrion, Jugoslavujon kaj Grekujon li multe propagandis.

Unu refuto ĉiusemajne!

La kontraŭuloj asertas,
ke Esp. ne estas tiel facila lingvo, kiel la espistoj fanfaronas. Oni ne diru, ke E. estas lernebla dum kelkaj tagoj. La facileco de E. ne estas absoluta, sed realtiva: Esp. estas tre facila k o m p a r e k u n l a n a c i a j l i n g v o j. Krome, la E.-gramatikistoj malfaciligas la lingvon pli ol necese per troa subtiligo de ĝiaj gramatikaj reguloj, anstataŭ lasi al ĝiaj uzantoj plejeblan liberecon.

Ĝi kriis ankoraŭ kaj estis terure. Mi surmetis la sagon kaj streĉigis la tendenon. Mi ne sciis, kien mi pafu. Sur la aglon, por ke ĝi elasu la vulpon, kiu jam estis pli morta ol viva aŭ sur la vulpon tra la kapo, por ke ĝi fine mortu? — Ne intermetu vin en aferojn, al vi egalajn, mi diris al mi mem! Kio okazas tie ĉi, okazas ĉiutage milfoje kaj centfoje dum ĉiu minuto.

Subite laŭte kriis la aglo tiel, ke eĥis la kanaro. Facile ĝi leviĝis kun la kaptaĵo, kiu senstreĉe pendis en ĝiaj ungegoj. Sango gutis de ĝi el la aero.

Poste mi trovis la kaptaĵon de la vulpo en la herbo: tri junajn vanelojn. Kio instigis eble la aglon, preni la fortikan kaj defendeman kaptaĵon, en tempo, kiam ĉie estas abundo da sendefendaj junbestoj? Kio eble instigis la vulpon, dum la luma tago iri trans la liberan ebenon anstataŭ tra la ŝirmanta kanaro? Mi ne scias. Probable estas, ke en iu vulpejo kriis junaj vulpoj je la patrino, kiu ne hejmenvenis, pli kaj pli laŭte kriis, ĝis kiam ili malsatiĝis morte. La naturo ja ne volas idojn de vulpino, kiu dum hela tago iras trans la liberan ebenon.

Jes, la naturo estas terura! La naturo estas kruela. Senkompate ĝi punas ĉiun malgrandan pekon, ĉiun nesingardecon, ĉiun malgrandan malatenton kaj ĉiun malgravan forgeson, ĉiun sensagecon, ĉiun necertan hezitemon, ĉiun mallaboremon kaj ĉiun malfortecon. Kaj la naturo konas nur unu punom: la morton! Ankaŭ tiu estas unu el la grandaj leĝoj, ke post ĉiu peko sekvas la malbono. Senkompate fera leĝo, leĝo de la severeco! Ĉie ĝi estas: en la varmego de la suno, en la akra malvarmo, en la ĉion penetranta malsekeco kaj en la sekeco, en la altiĝantaj, ŝirantaj akvoj kaj en la kirla ventego, en la hurlado de la lupoj, kiel en la embuskado de la araneo, en la spiona rigardo de la akcipitro kaj en la buŝego de la ezoko, en la sumado de la tabanoj kaj en la svarmado de la malsanigaj ĝermoj.

La severeco postulas precipe ĉiam ree nur unu: la laboron. La maloportuneco de la vintro devigas la pasbirdojn je la granda vojaĝo. Multaj dum tiu pereas! Malsato devigas la lupon je irado tra la lando, altiĝanta akvo pelas la bestojn sur la montojn. Sekeco instigas aliajn bestojn, sin enfosigi en la ŝlimon por somera dormo. Kaj la morto, kiu ĉirkaŭvagas en miloblaj formoj, en la akvo, en la aero, en la mallumo de la arbaro kaj en la tintanta herbo devigas la beston, atenti ĉiun momenton de ĝia estado, provi la venton kaj aŭskulti ĉiun brueton, atenti la plej facilan tremeton de la tero, sin teni senmove kaj senspire atendi, por ke la malamiko ĝin ne ekvidu, aŭ fuge kuri, por sin savi. Tie ĉi estas ĉiam atenteco kaj vigleco, sinregado kaj forto risortanta.

Danĝero, mizero! Kiel minacantaj demonoj ili ombrumas ĉiun vivon de la unua ĝis la lasta momento de la vivo. Leĝo de la severeco. Ĝi sajnas kruela, sed estas en ĝi boneco. Severeco grandigas la prestitaĵon. Severeco fortigas la vivon. Sen severeco ne estus vivo plu sur la tero.

Tiu pelanta kaj tiu malhelpanta mizero, la limigo kaj barigo en ĉiuj aĵoj, tiu devigo al la modesteco, al la eteco, al la simpleco validas same por ĉiuj. Estas neniu, kiu povus sin savi. Tiel plifortiĝas la fortikulo pli kaj pli, sed la malfortikulo, kiu ne plenumas la celon de la vivo, devas morti. Ankaŭ en la arbaro estas severeco. En la arbustejo, kiu tralasas tiel malmulte da lumo kaj tamen estas tiel multaj, kiuj malataj kreskas sur la tero kaj bezonus la sunon. Malgrande kaj ete ili vivas de la malmulta suno, kiun tralasas la granduloj, potenculoj, plenumita de arda sopiro je suno, deziro, kiu ne finas kaj ne plenumiĝas. Sed se la ventego faligis unu el la granduloj, tiam altiĝas subite la vivo en la multaj subpremitaj kiel liberigita risorto kaj konenciĝas sensenca, malsata kuregado al la lumo. Ve, kiam unu postrestas; ve, se la kronoj de la pli rapidaj fermiĝas super ĝi; ĝi restas izolita de la vivo. Malsupre forprenas al ĝi la fortikuloj la sukojn kaj supre la lumon. Pli frue ol ĉiuj aliaj ĝi havas flavajn foliojn en la aŭtuno. Pli frue ol ĉiuj aliaj ĝi havas la unuajn sekajn branĉ-

Ĉu vi estas aktiva esperantisto?

Se jes,

ĉu vi jam anoncis vian nomon por

TUTMONDA ADRESARO DE LA ESPERANTISTOJ 1938?

Se ankoraŭ ne,

anoncu vin tuj, ĉar la Adresaro aperos precize la 15-an de decembro 1937.

Konigu nomon, profesion, adreson

por ke la tutmonda esperantistaro sciu pri vi kaj povu uzi viajn servojn!

Simpla 2-linia **anonco** kostas aŭstr. ŝ 1.40 aŭ 2½ int. poŝtresp. kup. Ĉiu paginto ricevos la Adresaron **senpage**. Kiu deziras korespondi, interŝanĝi ktp., pagos la samon por teksto ĝis 8 mallongaj vortoj (40 literoj).

Vi povos ankaŭ pagi al **aŭstria poŝtŝparkasokonto** D 123.826 sub la nomo „Aŭstria Esperantisto, Korneuburg".

La Adresaro estos en formato de 15 je 23 cm.

5000 adresoj el 80 diversaj landoj!

Internacia Esperanto-Muzeo, Wien, I., Neue Burg, Aŭstrio.

Internacia Esperanto-Muzeo.

Wien, I., Neue Burg, Aŭstrio.

Kotizo unufoja: 17 sv. fr.

Novaj membroj:

L. A. **Curchill,** Derby, Anglujo.

Bertrand **Constans,** Narbonne.

Ni kore salutas niajn novajn Dumvivajn membrojn kaj dankas al ili pro ilia helpemo al nia bona afero.

Donacojn sendis: P. Flageul, Issy; Suda Kruco, Eindhoven; P. Vernier, Romans; E. Osimek, Warszawa; Feder. E. Catalana, Barcelona; Libro Servo FLE., Amsterdam; La Juna Vivo, West Grafdijk; J. H. Murray, Detroit; Dyba, Berlin; O. Jensen, Isafjordo, Islando; Przybowski, Warszawa; E. Buchty, Aachen; L. Rodo, Paris; Ĉehosl. Grafiska Unio, Praha; d-ro A. Vargas, Valencia, Mexico.

RADIO

SOS-voko al vi!

Dum multaj monatoj la loĝantoj donacas en nia lando por la malriĉuloj kaj helponbezonantoj almenaŭ 5 ŝilingojn kaj havas por ĉi tiu sumo la rajton elekti muzikaĵon, kiun poste la orkestro de Radio-Wien prezentas al la aŭskultantaro aŭ kiun oni ludigas per gramofondiskoj, kiuj estas en la arĥivo de Radio-Wien. Ankaŭ ni esperantistoj deziras partopreni en ĉi tiu servo al la mizeruloj kaj prezentis al Radio-Wien diskon kun kantoj el operoj, kantitaj en E. de famaj kantistoj. Radio-Wien nun informis nin, ke la diskoj estas tro maldikaj (ili estas el celuloido fabrikitaj de iama Komerco Unio en Dresden) kaj ne povas esti uzataj. Ni nun deziras disaŭdigi ĉiun sabaton iun Esperanto-paroladon aŭ kanton de gramofondisko en Radio-Wien kaj pro tio petas, ke vi samideanoj helpu al ni. Sendu ĉiun diskon, kiun vi posedas donace al Internacia Esperanto-Muzeo, kiu volonte disponigos la diskojn al Radio-Wien aŭ alia Radio-stacio. Tio estas grava propagando!

Samideane Steiner, Wien, I., Neue Burg.

Radio-Dissendoj.

Radio-Wien. Nuntempe nur unufoje en la monato disaŭdigas en Esperanto.

5. XI. „Pri belaj monaĥejoj en Aŭstrio".

10. XII. „Je Kristnasko al Aŭstrio". parolas kort. kons. H. Steiner, gvidanto de Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio.

Bordeaux-Lafayette: La 1. mardon de l'monato 18 h 45—19 h.

Bulguraj sendoj: Ĉiun 15. de l'monato E.-kronikon.

Radio-Ĉeĥoslovaka: 9. XI. Univ. prof. d-ro Absolon „Flutoj 30.000-jaraj", 16. XI. Libro-novaĵoj en la E.-literaturo", 23. XI. d-ro Zwicker „Propagando anstataŭ programo", 30. XI. Univ. prof. d-ro Stiebitz „La sorto de la antikvaj diktaturoj kaj diktatoroj" (1. en Greklando) ĉiam de 18 h — 18 h 15 el Mor. Ostrava.

Hilversum (Nederlando) (22 h 40 — 23 h 10 Greenw. tempo): 14. XI. Aleŝ Berka el Brno „La ĉeha popolo", 28. XI. Pastro C. A. Ouwendijk „Peko-konscio".

Lille: E.-kronikoj ĉiun sabaton 13 h 45 —14 h.

Je memoro al Sigizmondo Levanjevski, tre eminenta aeronaŭto, kaj al liaj kunuloj.

Levanjevski Sigizmondo,
Aglo de Ruslando
Ve atingis al mar'fundo,
Malgraŭ sia grando...
Do, pereis li kun aro
De siaj kunuloj;
Kiel li, brava anaro
De eminentuloj.
Dum flugado super tero
En aeroplano.
Aŭdu!... sonas en aero
Kantad' de l' peano.
Je l' glorego de la vivo
Kun nom' Sigizmondo,
De l' aerspac' kavaliro
Kaj de l' mara fundo...
Kaj de lia kunularo,
Jam ne ekzistanta;
Kiel li, brava aglaro
En la mar' naĝanta...
Kun flugiloj frakasitaj
Kaj sen la viveco,
Sed de l' laŭroj ornamitaj
De la heroeco!

Kazis Vidikaŭskas, Philadelphia, USA.

Forgesas ofte oratoro,
Ke silento estas oro.

Ŝparu vorton, ŝparu forton,
Pli da ago ol da blago.

FEZ.

---

etojn kaj senfolia kaj aĉigita staras ĝia kadavro, kiam la aliaj staras sur la alteco de la vivo, — ĝis kiam ĝin faligas la skaraboj kaj la ventego.

Kelkfoje falas unu el la granduloj meze en la vivo, unu el tiuj, kies suproj formas la altan tegmenton kaj kies folioj sin banas alte super la tero en la neaĉigita brilo de la suno. Tiam subite estas ŝirita multangula truo en la kronotegmento, de neregula formo, tra kiu enrigardas la ĉielo kaj mi ekvidis, ke tiu ĉi poligono havas tiom da flankoj, kiom staras najbaraj arboj ĉirkaŭ la falinta. Ĉiam estas la limo rompita inter du suproj. Mi ekkonas, ke ja tie ĉi limoj estas inter la unua kaj la alia, preciza divido de la spaco: Ĝis tie ĉi kaj ne pli foren vi povas etendi viaju brancojn. Ĝis tie ĉi estas mia aero kaj mia lumo. Tie, kie multaj kune vivas, ne povas ĉiu agi, kiel li volas. Tie li devas sin subordigi al la leĝoj, kiuj estas por ĉiuj. Tie li devas atenti la proksimulon kaj lin konsideri.

Sed klaraj limoj estas nur tie, kie la najbaroj estas same fortikaj. Se unu estas pli malfortika kaj ne povas reteni la lokon, tiam malvastigas ĝin la aliaj, ili etendas antaŭen la brancojn kaj radikojn en ties kampon, prenas al ĝi la lumon kaj nutrajon, dispremas ĝin inter si.

Se jam sole staras kelkiu kaj havas lumon kaj varmecon de ĉiuj flankoj, neniu malhepos ĝian radikejon. Ĝi havas pli bonan ŝancon; sed ĝi estas sole ankaŭ dum la ventego kaj neniu estas tie ĉi, sur kiu apogi ĝi povus.

Do ankaŭ tie ĉi estas la batalo, la batalo je la vivo, kiu mortigas la pli malfortikan. Kaj kiel en la malluma arbaro, tiel estas ĉie, kie estas verda: sur la sablejo kaj en la kanaro. Leĝo, unika, granda leĝo: severeco!

Ne, oni vivas je plezuro. Kaj tamen ĉiu vivas volonte kaj ŝirmas kaj timas sin je la morto. Sed multa, kio estas severa, sentas la besto ne tiel, ĉar nome ĝi ne konas ion alian. Ĝi ne havas la eblecon, kompari, kaj ĝi estas ankaŭ ne kapabla je tio. Nu, la vivo estas tia; tion oni ne povas forigi. Ke la malsato instigas la beston al la laboro, ĝi ne malbone sentas. La besto volonte laboras, pri tio oni ne povas dubi. Ĝi ne sentas sin turmentita, ŝarĝita.

Krome plezurigas la naturo al la besto tion, kion ĝi bezonas kaj kio al ĝi estas utila tiel, ke la besto multe laboras sen interna instigo, nur ĉar tio estas agrabla al ĝi. La naturo agrabligas al la besto la odoron kaj la aspekton de la nutraĵo, la serĉadon je ĝi kaj la manĝadon. La naturo lasas al ĝi agrable senti la varmecon kaj la lumon de la suno, por ke serĉu la besto la sunon kaj sin lasu traradii. La naturo lasas al ĝi ami la purigantan kaj sanigantan efikon de la akvo kaj ŝlimo, por ke ĝi sin banu. Fine mi vidas ĉe ĉiu besto, kiel ĝi gojas pri la propra fortikeco kaj la moviĝebleco; la juna besto ĝoje saltas kaj kuras, ludas kaj luktas. Tio ĉi donas al ĝi certe plezuron; tion oni vidas klare. Tio estas ankaŭ necesa, ĉar tio fortigas la muskolojn kaj la ostojn, instigas la kreskadon kaj igas la beston vivopova. Sed ankaŭ la multjara besto havas la deziron, sin movi, iri kaj kuri, rampi kaj naĝi, grimpi kaj flugi. Kiel ofte mi vidas la fiŝojn saltantajn nur pro nura plezuro, aŭ la rabobirdojn tutajn horojn flugi, kun senmovaj flugiloj sin bani en la venteto kaj en la suna varmeco.

La naturo agrabligas al ĝiaj estaĵoj tion, kio al ili donas forton. Nur la homo estas tiel saĝa, ĝoji pri tio, kio lin malfortigas! La karakterizoj de la nature kondiĉita kaj n a t u r e l i m i g i t a plezuro estas, ke ĝi neniam estas tro multa, ke ĝi ree estas ĉiam nova kaj bela. Ĝi fortigas la unuopan kaj la specon.

En la severeco estas ankaŭ la amo, ĉar nome la amo ne estas io malfortika kaj sentimentala, sed ĝi estas la plej alta forto. Kaj kiam foje la fortikuloj, junuloj, ĝojaj kaj ardaj uzas la amon, tiam printempiĝos en ĉiuj finoj!

Represo aŭ traduko nur kun permeso de la aŭtorol!

Kostumoj el Aŭstrio

1. Steiermark
2. Vorarlberg

3. Oberösterreich
4. Tirol

1. Liglando Stirio, 2. Vorarlberg, 3. Supra Aŭstrio, 4. Tirolo. (Kliŝo de Heimatdienst.)

INFORMOJ EL AŬSTRIO

La Aŭstria Kanceliero d-ro von Schuschnigg pri Aŭstrio.

El intervjuo kun la ĉefredaktoro de „Independance Belge-Brüssel".

„Ni neniam aliĝos al iu ajn kontraŭ-germana bloko. Pro tio entute ne povas esti iu demando pri tia blokformado. Cetere ni firme staras sur la fundamento de la Romaj Protokoloj.

Pri aliĝo, absolute kaj tre klare: Ne! Nia raso, nia lingvo, nia kulturo kaj nia historio estas germanaj. Tio estas certa. Sed Germanujo estas lando kaj Aŭstrio estas alia lando. Ni ne volas la aliĝon kaj sub nenia preteksto. Ni antaŭ ĉio firme persistas je nia nepra memstareco, je nia plena sendependeco. Ni havas bonajn rilatojn kun ĉiuj najbarŝtatoj, ni volas vivi kiel bona amiko ĉe la flanko de Germanujo, kaj Berlin tion ankaŭ tre bone scias."

Nova „Reichsbrücke" en Wien.

La 10. oktobro la Federacia Prezidanto inaŭguris en ĉeesto de la registaro la novan ponton.

Ministro por Komerco kaj Trafiko d-ro Wilhelm Taucher je tiu okazo faris jenan paroladon: „Giganta verko de aŭstria laborista diligenteco estas kreita per ĉi tiu ĉen-ponto, laŭ grando la tria en la mondo .. En preskaŭ kvarjara streĉiga laboro aŭstriaj inĝenieroj kaj laboristoj finkonstruis ĉi tiun verkon el aŭstria konstrumaterialo."

La longo estas 1230 m, la veturvojo por 6 apudveturantaj veturiloj estas 16½ m larĝa, la du trotuaroj po 4½ m. La du pontoportaloj superas la pilastrojn je 33½ m. Por la ŝtala parto de la ĉenponto kaj la ekipo de la betonparto oni bezonis 14 milionojn kg da fero. La subkonstruaĵon oni faris per 8.400.000 kg da Portlandcemento kaj 50.300 m³ da makadamaĵo kaj sablo. Por la irvojoj oni bezonis 500.000 pavimŝtonojn kaj 10.600 m² da asfalto, por la ŝmirado de la ŝtalverko 50.000 kg da farbo. Pli ol 1 Miliono da laborsekcio sur la konstruloko kaj ĉe la liverantaj firmoj estis necesaj por la giganta konstruaĵo, kiu kostis 31.150.000 ŝilingojn.

Kardinal-Ĉefepiskopo de Wien d-ro Innitzer benis la ponton kaj poste la Federacia Prezidanto inaŭguris la ponton per pli longa parolado, en kiu li diris: „. . . . . ĉi tiun verkon ni dankas al la konstruvolo de la nova Aŭstrio, al la spirito de niaj inĝenieroj kaj teknikistoj kaj al la diligenteco de nia nelacigebla laboristaro. Al ili la ŝtato ŝuldas rekonon kaj dankon!"

Poste formiĝis festirantaro, konsistanta el ĉiuj personoj, kiuj iel estis kunlaborintaj en la konstruado de la ĉenponto, kaj pretermarŝis antaŭ la Federacia Prezidanto kaj la festgastoj.

Betona miraklo en Wien.

La granda betona ujo kun areo de 25.000 kvadratmetroj estas 7 m alta kaj portata de 800 kolonoj. En ĝi 145.000 kubikmetroj da akvo havos lokon. 200.000 m³ da tero devis estis elfositaj kaj 15.000 m³ da betono uzitaj. La kostoj estis 4,2 milionoj da ŝilingoj.

Per la nova kovrata ujo la akvoprizorgo de Vieno fariĝis la plej bona inter ĉiuj grandurboj en la mondo. Tiel varmega somero ne povos esti, ke Wien devus suferi je trinkakvomanko, ĉar al la 20 akvujoj kun 240.000 m³ de la bonega fluidaĵo nun venis la nova akvujego.

Ŝtonsarkofago trovita en la Centro de Wien.

Vid-al-vide de Kancelierejo en la centro de la urbo oni trovis ĉe la elfosadlaboroj por la nova „Patriota Fronto-domo" 4 m sub la tero sarkofagon el ŝtono, 2 m longa, 2000 kg peza, kies vandoj estas 20 cm dikaj. En la sarkofago oni trovis skeleton kaj vazon el maldika vitro.

Certe la trovaĵo originas el la unua ĝis tria jarcento p. K., el tiu tempo, en kiu la iama kelta Vindevon fariĝis la roma Vindobona.

Esperanto ĉe Aŭstria Poŝto.

Nun ankaŭ la Poŝtdirekcio por Liglandoj Oberösterreich kaj Salzburg en sia „Oficiala Informilo nro 4" alvokis al lernado de Esperanto.

ILI PLENDU KAJ PLENDU . . .

Preskaŭ en ĉiuj landoj
La esperantaj agantoj
iel malkonsentas,
amare plendas
pri la verda popolamaso —
kaj en ofta okazo
ne sen bazo.
Ekzemple la esperanta instruisto,
instruinta kun oferema persisto,
ĉe kursfino kun teruro
kaj malplezuro
konstatas,
ke malbone la afero statas:
la regulojn de l' gramatiko
en la praktiko
liaj lernantoj ne ŝatas,
ĉe ili akuzativo
eterne egalas al nominativo:
„Havas ni hodiaŭ festvespero,
Kukojn estas sur telero".
Jes, ofte ofendite plendas
la esperanta instruisto
— li ja rajtas esti pesimisto
sed kial plendas la propagandisto?
Propagandajn paroladojn liajn
anemiajn
pri freŝaj faktoj antaŭdiluvaj
oni ja kelkiam partoprenas
— eĉ neesperantistoj venas —
inerte aplaŭdas,
poste eĉ laŭdas,
ĉar ĉiu parolanto
kun kortiklo ja aŭdas,
kiam lin oni laŭdas.
Multe plendas ankaŭ la eldonistoj,
kiuj donas al la esperantistoj
nutraĵon spiritan,
diverskvalitan:
ampleksajn — du aŭ kvarpaĝajn — gazetojn,
dolore-dolĉajn amdelirojn de poetoj,
verkojn literaturajn,
konsistantain el romanoj aventuraj
kaj originalaĵoj nematuraj,
kiujn honore karakterizas malavara malŝparo
rilate al lingvo — kaj preseraroj.
Jes la eldonisto plendas
ke senrezulte li dissendas
varbilojn, reklamilojn
— ke librojn li, tamen ne vendas,
ĉar vera esperantisto neniam ion abonas
aŭ mendas.
Sed pleje plendas,
alarme lamentas
la esperantistaj societoj — la grupoj,
ĉefe la kasistoj, la monavidaj lupoj,
ili la in-di-fe-rent-ul-ojn pacajn
la mal-la-bor-em-ul-ojn lacajn
ĉiam per altrudo turmentas,
ilian nepagemon malatentas.
Bedaŭrinduloj! Vane ili admonas
ĉar ili ne konas
la esperantistan devizon:
neniam pagi kotizon.
Do ili plendu kaj plendu —
nin tio ne ofendu!
Je ĝusta uzo de l'akuzativo ni ne pretendu,
pri efikaj propagandmetodoj nian kapon ne turmentu,
librojn, gazetojn — eĉ propralandan — ni ne mendu,
kotizojn al kasisto neniam sendu,
ĉiujn avertojn tiurilatajn malatentu!
Prefere ĉiam ni reteneme nur silentu
kaj indiferentu,
sed al la agantoj kaj al gvidantoj niajn postulojn ni prezentu,
kaj de ili tuj senprokaste la plenumon atendu —
jes, ni plenrajte maldiligentu
kaj nin sentu
kun fiero
„altidea kavalir' de la verda stelo". H.

Bulgara Esperantisto.

La spritaĵo en la servo porpaca.

(Trafu la militon per ridindigo!)

„La efikanta sprito jam faris mondhistorion. Eĉ ne estas dubo, ke ĝi ankoraŭ havas ŝancon, kiam minaco, instruo kaj bonvolemo ne plu efikas.

En la terura febro de militemo ĉirkaŭe, la Svisa ŝerc-gazeto **„Nebelspalter"** (nebulfendanto) havis la originan ideon, aranĝi konkurson pri tio, kiel oni per spritaĵoj en vortoj kaj bildoj povas helpi la mondpacon.

La unuan premion gajnis propone, ke militdeklaroj estonte estu ŝtelataj antaŭ la transdono — jen aludo al la fakto, ke la germanlanda militdeklaro al Francujo en 1914 antaŭ nelonge estis ŝtelata el la germana militarĥivo (laŭ la rimarko de la proponanto) bedaŭrinde 22 jarojn tro malfrue. Ekzistas krom tiu klasike sanga ŝerco ankoraŭ tuta vico de sarkasmaj spritaj glosoj: Jen pri la „Cirkulado por la sekurigo de la paco": El municifabriko suprenflugas militaeroplanoj kiuj per bombĵetado plene detruas la propran fabrikon. Aliaj proponas, meti militprovokantojn en la kanontubon aŭ doni al la milit-industriistoj (armil-kapitalistoj) kiel solan vivrimedon la renton de milit-invalido. Kvazaŭ fantoman punon elpensis la lasta konkursanto, kiu devigas la militdiktatorojn, preterpaŝi **„honoran fronton" de la 35 milionoj de mortintoj, vunditoj kaj kripluloj** el la mondmilito **kun, al saluto levita mano.**

Kaj per tiu kruela bildo la sprito forlasis la regionon de nefruktedona nura mokado kaj fariĝis terura akuzo, tondra plendkrio de ĉiuj mortpafitoj, kadukuloj kaj kripluloj kontraŭ tiuj, kiuj brue skuas la sabrojn, kaj „sang-akciuloj" de ĉiuj popoloj kaj ĉiuj epokoj. Voko en la 11a horo. — Kiu ĝin aŭdas?"

Portu la stelon.

Stelon, stelon, verdan stelon,
Fratoj, portu kun kuraĝ'!
Kaj en lumo de l'espero
Ĉiam brilu la vizaĝ'!

Malamikaj kontraŭdiroj,
Fratoj, ne timigu vin!
Mokoj, ridoj kaj ĉikanoj
En batal' fortigu nin!

Por la venk' de Esperanto
Fratoj, ho! klopodu vi!
Dank' kaj beno de l' homaro
Estu rekompenc' al ni.

Stelon, stelon, verdan stelon
Fratoj, portu kun kuraĝ'!
Kaj en lumo de l' espero
Ĉiam brilu la vizaĝ'!

P. Francisko Meŝtan
(El Radiaro.)

La stelo vin vokas!

De Edward Weber.

Al tutmonda esperantistaro
Nia stelo, kvin konsilojn donas
Kaj al vigla propaganda faro
Ĝi invitas kore kaj admonas:

„Certe ni atingos nian celon,
Des pli frue ĉiu se parolus
Ĉie nian lingvon kaj la stelon
Verdan ĉiam porti do bonvolus."

„Estu ĉe kunveno kaj kongreso,
Varbu anojn por ideo nia.
Tiam granda estos la sukceso
Kaj la beno de l'homaro via."

„Nun plej laste ankaŭ ne forgesu,
Aĉetu niajn librojn kaj gazetojn.
Do rapide la afer' progresu;
Se ni sekvos are tiujn petojn."

La vivo de Alfred Nobel filmota.

Nobel, la inventisto de dinamito, eble estas pli konata kiel fondinto de la „Nobel-premioj" por elstaraj verkoj en scienco, literaturo kaj paclaboro, kiuj premioj estas kalkulataj kiel la plej altaj internaciaj distingoj en tiuj kampoj.

La granda sukceso de la filmoj pri Louis Pasteur kaj Florence Nightingale inspiris Columbia Film Co. daŭrigi laŭ la sama linio. Reĝisoro estos Robert Riskin.

(Svedish Int. Press Bureau.)

Kraboj migradas.

Ne nur birdoj migradas, sed ankaŭ kraboj. Tio estas fakto ĵus trovita de prof. R. V. Truitt el Maryland. Li alkroĉis sian adreson al 10.000 kraboj kaj proksimume 1100 estis poste kaptataj kaj resendataj al li de fiŝkaptistoj en pli sudaj lokoj ĉe la atlantika marbordo.

(Scienca gazeto.)

Artaĵoj el Nederl. Hindujo.

Nia s-ano C. A. A. Haccou, pensiita registara oficisto, en Sultanlando Djokjakarta, Willislaan 1, Javo, Nederl. Hindujo sendis al ni fotojn pri belaj arĝentaj artaĵoj, faritaj de la indiĝenaj metiistoj, kiuj estas tre malmultekostaj tie kaj tre plaĉas al la eŭropanoj, Ekzistas centoj da formoj kiel skatoloj, vazoj, tualetaĵoj, korpornamaĵoj ktp.

La **ĝusta fundamento** por Esperanto estas la malmultekostaj libroj el **Tagblatt-Bibliothek**, Wien, I., Wollzeile 20.

Esperanto en 10 lecionoj. Metoda enkonduko por meminstruo k. kurso (21.—23. milo, nro 230 de la biblioteko) S —.52

Unua Esp.-legolibro p. komenc. k. kurso. Elektita prozo k. poezio k. laŭvorta germ. traduko. 6.—10. m., nro 283 S —.52

Vortaro Esp.-Germana. Kun ĉiuj de Akademio rekonitaj vortoj k. fakesprimoj. 22.—24. m., nro 335 S —.52

Vortaro Germana-Esp. 180 paĝa k. 20.000 germ. vortoj k. 30.000 E.-tradukoj. 14.—16. m., nro 385 ĝis 388 S 2.08

Mi parolas Esp.-on. Enkonduko en la E.-konversacion k. vorta germ. trad. k. klarigoj. 6.—8. m., nro 426 S —.52

Esperanta Komerca Korespondo. Komercaj modelleteroj en E. kun akompanteksto germ. nro 500/1 S 1.04

Zamenhofaj Kongres-paroladoj. Ĉiuj de Zamenhof faritaj kongresparoladoj kun germana trad. 170 pĝ. S 2.08

Eldonanto Dro Emil Pfeffer, Haveblaj en ĉiuj librovendejoj kaj ĉe la eldonejo.

Mendeblaj estas la aĵoj nur kontraŭ antaŭpago. Kontraŭ resp. kup. s-ano Haccou, del. de IEL, sendos al vi fotojn kaj informojn.

Ankaŭ rekte mendeblaj ĉe „Verzendhuis Mevr. C. van Reyendam, Gondolojoe Djokjakarta, Javo".

EL LA MONDO

AUSTRIO. „Oesterreichisches Verkehrsbureau" en Wien, I. Friedrichstrasse, kun siaj filioj en-kaj eksterlandaj donas ĉiujn informojn pri belaj, malmultekostaj vojaĝoj al kaj en Aŭstrio. Uzu la servojn. Skribu en E.

CSR. Esperantista libertempejo Lázně Bělohrad, 4-pĝ. propagandilo kun bildoj. Tie okazis ĉijare „E-kursoj", pri kiu raportas 4-pĝ. propagandilo.

EGIPTUJO. Estas fondita Universala Egipta Esperanta Oficejo por Turismo, ĝenerala direkcio, Port Said, 10 Rue el Mokattam. Ĝi donas ĉiujn informojn pri malmultekostaj vojaĝoj.

Finnlando. Kristana E.-Ligo de Finnlando eldonis denove sub gvidado de Hugo Salokannel, prez. de E.-Soc. de finnaj fervojistoj, flugfoliojn en 3 koloroj pri la graveco de E. por internacia kristana misio.

Italujo. La urba „Ksiloteko" Cormio de Milano, unika muzeo pri ligno kaj ties apliko, uzas Esperanton.

Italujo. S-ano Gallo Lassere Paolo en Torino sendas al ni vidaĵkarton pri ekspozicio de E.-gazetoj ktp., inter ili „Aŭstria Esperantisto" kaj „Viena Foiro".

Jugoslavujo. Dum julio okazis en Ljubljana la fondkunveno de Slovena E.-Asocio.

KATALUNUJO. Nia pioniro Jaume Grau Casas faris ĉe „Ateneu Popular" en Villafranca del Penedès poresperantan paroladon antaŭ 300 personoj kaj somer-E-kurson. En loka gazeto li aperigis artikolon „Esperanto, cu kabineta eksperimento?"

LITOVUJO. Okaze de la regiona kantfesto okazis en Mariampole E-ekspozicio,

Portugala Esperantista Unio, portugala sekcio de Internacio de Proleta Esperantistaro **(IPE)** translokiĝis al Paris, 24, Rue Richer ĉe „Federacio de l'Portugalaj Elmigrintoj en Francio".

USSR. La oficiala revuo de Miĉurin-a Scienc-Esplora Fruktkultura Instituto en USSR publikigas E.-paĝon kun indiko de la enpresitaj artikoloj. Literatura redaktoro estas nia s-ano Borisoglebsky.

KOMERCO

Brazilio. La oficiala gvidlibro de 9. Int. Specimena Foiro en Rio de Janeiro (aŭtuno 1936) enhavis ankaŭ parton en Esperanto.

Finnlando. Oni produktas alumetojn kun E.-teksto sur la skatoloj en tri diversaj koloroj.

Hungarujo. Granda banko „Hungara Generala Kreditbanko" en Budapest uzas E-on en sia korespondado kaj la plurlingvaj presaĵoj enhavas ankaŭ E.-tekston. Budapest V., Dorottya-utca 5.

E.-lingva varnomo:
Nederlanda firmo H. J. Pfaff, fruktkulturejo en Winschoten, produktas vinberan moston sub la nomo „Amato".

Hotel Esperanto en Selce, Jugoslavujo.
4-paĝa propagandilo por restadi en ĉi tiu marbordloko apud Crikvenica. Pensiono: 70 Dinaroj.

Glumarko „Aleo de D-ro Zamenhof, Lázně Bělorad."

EL LA LEGANTARO

„... Unu el la gravaj kaŭzoj, kial esperantistoj ŝatas veni al via lando, certe estas, ke oni havas tiom bonan ŝancon ofte renkonti espistojn. Tiun aferon vi devos eluzi, ĉar ĝi estas tre grava. Mi kredas, ke Radiokursoj estas bonaj helpiloj por la fremdultrafiko. La homoj ŝatas vojaĝi en lando, kies enloĝantojn oni povas kompreni. ... En nia tempo ne sufiĉas nur atendi ĝis kiam venos la turistoj per si mem. Oni devas per ĉiuj rimedoj klopodi kapti ilian atenton. Kaj ke Esp. por estas tre taŭga, tion mi ja multfoje spertis. **Arfinn Jensson, Stabekk, Norvegujo.**"

„... Mi estas tute certa, ke via lando kaj ĝiaj enloĝantoj profitis de Esp., kaj mi tial ne komprenas, kial oni en la radio traktas tiun lingvon malpli favore ol la aliaj lingvoj... Ĉu ne estas ideo ilustri la vesperajn elsendojn per muziko? Oni tiel faras en Italujo, kaj laŭ mia scio la aranĝo plaĉas al la aŭskultantoj Faru provon konigi al la cetera mondo la belan aŭstrian muzikon pere de Esperanto. Certe estas, ke la muziko parolas per si mem, sed tamen klarigoj, kiujn oni povas kompreni, ege faciligas la komprenadon... **Liv Sandberg, Bekkelaget, Norvegujo.**"

„Aŭstria Esperantisto mi kaj miaj grupanoj certe ŝatas legi kaj daŭre bezonas ĝin laŭnumere. **Chang Ching-Chin, Yunnanfu, China.**"

„Saluton al multe admirata batalanto por Esperanto, Hugo Steiner, flanke de **Fred L. Wharff, Los Angeles, California.**"

(Nia s-ano el Los Angeles sendas al ni du fotojn: 1 montras librobrankon kun la surskribo en angla lingvo „120 el la 10.000 Esperanto-libroj, reprezentataj en Intern. Esperanto-Muzeo en Wien" kaj la 2-a aron da E.-gazetoj, inter kiuj „Aŭstria Esperantisto". La bildoj

estas ĉi kolekto de propagandbildoj por Ameriko.)

Al Oesterr. **Verkehrswerbung**, varbadservo de Ministerio por Komerco kaj Trafiko, Wien.

„Ni dankas pro la senditaj Esp.-Broŝuroj, kiujn ni volonte dissendos al niaj membroj. Ni uzas la okazon, por diri al vi nian specialan rekonon pro la eldono de ĉi tiu bonega materialo. Ni krome estas pretaj, disdoni ankaŭ pluan materialon. Brita E.-Asocio.

„Akceptu mian plej altan estimon kaj dankemon pro via energia laboro por nia nobla ideo. Esp.-Societoj de la fervojistoj kaj tiu de nia urbo sendas siajn sincerajn simpatiaĵojn al vi. **H. Salokannel**, Uusikaupunki, Finnlando."

„Dezirante al vi la plej brilan sukceson je laŭdinda entrepreno . . . M. v. d. **Wielen v. Griensver**, eksternejinspektorino, Nymegen,"

„Por la adresaro kaj via laboro mi deziras sukceson. Via A. Weide, Aars, Danujo."

„Dezirante al vi grandan sukceson kun via laŭdinda entrepreno de Tutmonda Adresaro . . **A. Schild, Basel.**"

„Gojante pri la bona ideo de Tutmonda Adresaro mi deziras al vi plenan sukceson al tiu entrepreno . . . **Marsänger, Olten**, Svisl."

„. . . fine mi deziras al vi plenan sukceson por la adresaro kaj ke ĝi fariĝu enhavoriĉa kaj dika. **Max Saßmann, Linz.**"

„Mi ricevis vian interesan kajeron, en kiu rilatas la morton de d-ro Dollfuß, kiu estis kanceliero de Aŭstrio; ankaŭ estas en la sama kajero aliaj tre interesaj bildoj rilate al diversaj aferoj, kiuj estas bonaj por la propagando en nia lando. Mi gratulas vin sincere pri via progreso. Miajn humilajn gratulojn al via Gubernaro. **D-ro Ambrosio Vargas Valencia, Mexico.**"

„Tre atente mi legis Aŭstria Esperantisto. Bonvolu akcepti miajn gratulojn, ĉar mi tuj grandvalore taksis, ke via Aŭstria Esperantisto komprenigas la konceptojn de ideoj Esperantistaj laŭ demokratio. Kaj tiel, kiel skribis s-ro Saget, — Elbeuf, vi certe ludas laŭdindan rolon inter la pacemuloj, ĉar vi estas la konsolo de samideanoj, por aserti, ke nia movado ne tendas al iu ajn politika direkto, sed restas tute neŭtrala. Do akceptu mian aliĝon al via politiko.

M. Duchochois, Boulogne s. Mer, unu el la tri elpensintoj de nia standardo esperantista."

Skriba Esperanto-kurso. Tiu ĉi bonega ilo, por esperantigi homojn, kiuj estas en lokoj, kie ne okazas E-kursoj, estas ĉe ni en Aŭstrio tre ŝatata. Tin montras la vigla partopreno en ĉi tiu kurso, kiun ankaŭ ĉi-jare gvidas kort. kons. Steiner, Wien, I., Neue Burg. 3 leteroj el la 20 jam eliris. Novaliĝantoj ricevos la ĝis nun aperintajn leterojn. Prezo por la tuta kurso S 2.50 en poŝtmarkoj, eksterlandanoj pagos pro la pli alta afranko 7 int. poŝresp. kuponojn.

Io por pripensi!

Iam vivis paŝtisto, kiu posedis unu ŝafon, unu lupon kaj unu faskon da fojno. Li venis al rivero, tra kiu li devis transporti ĉion al la alia bordo. Fine li trovis mallarĝan boaton, en kiu li povis transporti ĉiam nur unu objekton. Nun li pripensis: Se mi prenus ekzemple unue la fojnon, tiam la lupo manĝus dume la ŝafon. Se mi prenus unue la lupon, tiam la ŝafo manĝus dume la fojnon, kaj, se prenus unue la ŝafon, ĉar la lupo ne manĝas fojnon, kion mi prenu poste, por ke ĉio alvenu bonstate al la alia bordo?

Jen la solvo: La paŝtisto prenis unue la ŝafon, transportante ĝin al la alia bordo, reveturis sola, prenis la fojnon kaj, por ke la ŝafo ne manĝu la fojnon, li reprenis la ŝafon. Nun li anstataŭis la ŝafon per la lupo, revenis kun ĝi al la alia bordo, reveturis sola kaj fine transportis la ŝafon kaj ĉio estis bonstate sur la alia bordo. Trad. Schidloff.

RECENZOJ

„Verda Stacio", E-almanako de „Ĉeĥoslovaka radio", 80 pĝ-. 15.21 cm, artista kovrilo, luksa papero, ilustr., eld. de Ĉeĥoslovaka radiofonia societo „Radiojurnal". Mendebla ĉe Verda Stacio, Brno, Kounicova 44 por 4 int. resp. kup.

La „Verda Stacio", tiel nomata de siaj internaciaj aŭskultantoj, eldonis ĉi tiun almanakon, kiun kompilis la s-anoj Dalibor Chalupa kaj Jiří V. Šamla. En interesa maniero la libro informas pri la laboro de Verda Stacio, prezentas al la leganto la ludantan aktoraron kiel ankaŭ la tempon kaj la enhavon de sia regula E.-programo kaj aldonas interesan drameton „Ĉu revo aŭ fakto?".

La unuopaj artikoloj estas verkitaj de eminentaj radio-fakuloj, i. a. de la prez. de Ĉeĥoslovaka Radio d-ro Ladislav Šourek kaj la dir. de Verda Stacio dipl. inĝ. Antonín Slavík.

Ni varme rekomendas la bele ilustritan libron, kiu krome estas bona propagandilo!

Eld. **„Gazeto de Ameriko"**, Rio de Janeiro. **Ismael Gomes Braga** „Veterano", 120 paĝa. Nun aperis la unua E-verko originale verkita kaj presita en Brazilio, kie tiel lerte la organizo laboras. Okaze de la „Festo de la Veteranoj", aranĝita dum la 29-a en Varsovio, oni sendis al ĉiuj veteranoj en la mondo demandaron. Jen la respondo al la demandaro, kiun faris veterano Gomes Braga, enmetante historiajn faktojn, rimarkojn kaj bonajn meditaĵojn. Ĉiu legu la libron kaj helpu per tio kuraĝigi niajn brazilajn fervorajn samideanojn al novaj eldonaĵoj. St.

Kuraĝigu la eldonadon de E.-libroj en Brazilio, mendante rekte de Livraria Editora da F. E. Brasileira, Av. Passos, 30, Rio de Janeiro, la „Unuan libron originale verkitan en E. kaj presitan en Brazilio": Veterano? de Ismael Gomes Braga, prezo afrank. broŝ. svfr. 1.50, tole bind 2.50 aŭ egalvaloro.

„Scienco kaj Pseŭdoscienco pri heredo kaj raso", originale verkita de Paul Neergaard, L. K., 12.16 cm, 56-pĝ., fr. fr. 6.50; 1937.

La libreto pritraktas tre aktualan problemon laŭ faka, scienca maniero en facile komprenebla formo. En nuna Germanujo oni donis al la rasa demando politikan signifon, kaj ĉiu deziras scii, kiel scienculo konsideras tiun problemon. Neergaard lumigas la fundamentajn leĝojn de heredado ĉe plantoj, bestoj kaj homo, disbatas la regantajn superstiĉojn kaj okupas sin pri diferencoj, valoroj, higieno kaj biologio de rasoj.

Esperanto en Brazilo, plinotindaj datoj kaj faktoj. Memorigaĵo de la 9 a Brazila Kongreso de Esperanto. Rio de Janeiro 1936.

La 18-paĝa libreto en belaspekta kovrilo kaj sur bela papero tre interese informas pri la E.-movado en Brazilio, kiu komenciĝis jam en 1898 per artikolo pri Esperanto en „Revista Brazileira" de Medeiros e Albuquerque, kaj apero de la unua lernolibro, la portugala traduko de la gramatiko de prof. Cart „Esp. en 10 lecionoj" de A. Caetano Coutinho en 1904. Duone la teksto estas en E. kaj portugala lingvo pro propagandceloj.

„El la nebulo" tre facila legolibro, originale verkita de Christian Hougaard, dua eldono ĉe Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhoj 1937. Ĝi estas vere tre taŭga legolibro por komencintoj. Precipe la unuaj ĉapitroj estas tre simplaj kaj imitas la frazojn de l' Csehmetodo. La enhavo, dividita en 19 mallongaj ĉapitroj, estas rakonto fantazia kaj tre akcentas la internan ideon de Esperanto. Lingvo kaj preso estas tre korektaj. La recenzanto nur trovis du mankojn: p. 15 malantŭen (malantaŭen), p. 18 Ankaŭ ne sufiĉa laboro mankos (Ankaŭ sufiĉa laboro ne mankos). Do la 23-paĝa libreto estas kiel unua legolibro post aŭ dum kurso por komencantoj tre rekomendinda.

„Pri la iamaj Tasmanianoj" de C. C. Cowling, D. E. E. A. Prezo 9 pencoj ĉe la aŭtoro ĉe Christ College, Hobart, Tasmanio.

12 paĝa kun bela kovrilo. La broŝureto informas pri „etnografio", „kiel la blankuloj unue renkontis la landidojn kaj pri la iompost-ioma malamikiĝo", „oficiala traktado kaj formorto" kaj „diversaĵoj", entute tre interesa.

Vegetara movado: „The Food Reformers' Year Book & Health Seekers' Guide for 1936—37", eldonita de London Vegetarian Society, 6 Duke St. Adelphi, W. C. 2 enhavas proponojn en diversaj lingvoj, inter ili en Esp. pĝ. 93 „Sugestoj por provizo de vegetara manĝo en hotelo aŭ alia loko, kie oni ne kutime provizas tion".

Ĉinujo: „La Mondo", organo de Ĉina E.-movado, skribas sub la titolo „Kies Ĉinio?" jenon: La vendejo de naciaj produktoj en Tientsin, kiu vendas subvestojn kun signo de „junulino sub sunombrelo", estis traserĉita kaj du el la dungitoj arestitaj de japanaj soldatoj, ĉar laŭ la logiko de japanoj, sunombrelo estas uzata por rezisti la sunon, kiu ja estas la emblemo de Japanujo, kaj tial la signo de sunombrelo signifas kontraŭ-japanan propagandon.

Militkontraŭuloj, absolutaj pacifistoj, Tolstojanoj esperantistaj anoncu vin al Int. Centro de la movado **Esperantista Pacifista**. Gvid. R. Melo, 30 Chemin Vert, Drancy, Franc.

„La eterna evangelio." Kvara libreto, verkis H. J. Pätiälä, Turku, eld. Misia Rondo, Veteli, Finnlando. 23-pĝ., malgrandformata, 1937.

„La Meditanto" Nr. 1 „Kiel eviti la malsanojn?" de Oskar Jensen, Isafjordo, Islando. 20-paĝa, multobligita.

En **„Praktiko"** estas desegnaĵo de D. Wranka, kiu prezentas generalon Julio Mangada, prez. de Hispana E.-Asocio, komandanto en la hispana registara armeo,kiu diras: „Sur tiu internacia batalkampo Esperanto povus trovi idealan aplikon."

Stjepan Mišak, Adana, Turkjo, eldonis „Informoj de E.-Domo en Adana" vešt-poŝformatan. Nr. 1 a. Senpaga aldono al aĉetantoj de aliaj libretoj; alie 3 sinsekvaj numeroj kontraŭ 1 resp. kup.

„Lingua Auxiliar", eldono de „Gazeto de Ameriko" en portugala lingvo por varbado en Brazilio, ekaperis komence de 1937. Direktorino Maria Idea de Morais, Rio de Janeiro, Brazilio.

„Esperantista Bahiano", oficiala organo de Esperanta Grupo de Bahia, Strato Bangala 18, Urbo Salvador, Bahia, Brazilio.

„Skania Informilo", organo de Sveda E.-Federacio Skane-distrikto, ĉe red. Jan Strönne, Malmö.

ČSR. Semajna gazeto „Proud" en Brno kaj infangazeto „Kulíšek" en Brno aperigas regule E.-kursojn.

Francujo. Taga ĵurnalo „Lyon Républicain" en Lyon aperigas E.-kurson.

En E.-gazeto **„Internacia"**, aperanta en Rosario, Argentinio, ni kun plezuro legas artikolon pri la fama komponisto aŭstria Anton Bruckner, verkita de s-aninoj Fohler kaj Schmirer en Vöcklabruck, Aŭstrio.

Ŝtelisto antaŭ juĝisto

Juĝisto: Kial vi forprenis nur la komercaĵojn kaj lasis la monon?

Akuzito: Ankaŭ vi tion riproĉas al mi kiel mia edzino. (El Radiaro.)

Eigentümer, Herausgeber, Verleger, verantwortl. Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 154. — Druck: Buch-, Kunst- und Zeitungsdruckerei „Albrecht Dürer", Wien, VII., Bandgasse 28

Die zweite Sprache für Alle

Deutscher Teil der Zeitschrift „Oesterreichischer Esperantist“

Mitteilungsblatt für die Mitglieder des **Oesterreichischen Esperanto-Bundes** und der **I. E. L.-Jugend**

Nr. 11 (26) 5. November 1937

Schriftleiter: Hofrat Hugo Steiner, Wien, I., Neue Burg
Konto bei der Postsparkasse D-123.826

AUS ALLER WELT.

Die Gegner des Esperanto behaupten, daß die Esperantisten lächerliche Narren sind. Aehnliches sagten sie über Edison, Zeppelin und die meisten anderen Erfinder. Die nachfolgende Zeit hat diesen „Narren“ recht gegeben. Ebenso wird die nächste Zukunft uns rechtgeben. Da wir Esperantisten dies wissen, haben wir mehr Recht, über jene Bedauernswerten zu lachen, die uns lächerlich machen wollen.

Menschen des Fortschrittes und guten Willens!

Wollt Ihr nicht mehr taub-stumm sein für Menschen, geboren außerhalb Euerer Grenzen?

Wollt Ihr nicht mithelfen, um den Völkern das Mittel zu geben, um einander besser kennenzulernen und dadurch mitzuarbeiten an der moralischen Abrüstung der Menschen und für das Kommen besserer Zeiten?

Unterzieht Euch der kleinen Mühe, Esperanto zu lernen!

Ihr müßt Esperanto lernen, weil den Völkern eine gemeinsame Hilfssprache nottut, die ihnen gestattet, einander zu verstehen und damit die blutigen Konflikte zu vermeiden, die die Menschlichkeit entehren; weil es nötig ist für diejenigen, die ins Ausland reisen oder die mit verschiedenen Ländern Briefwechsel treiben — als leichtes Mittel sich überall verständlich zu machen; weil die französischen Sendestationen eine internationale Sprache benötigen, damit das Wort, das über die Grenzen getragen wird, nicht gesperrt werde durch die sprachlichen Grenzen; weil für die Kaufleute eine Hilfssprache benötigt wird, um Geschäfte und Briefwechsel mit den verschiedenen Ländern zu erleichtern; weil Wissenschaftler und Techniker einer Sprache bedürfen, durch die sie über die Arbeiten, die in aller Welt erscheinen, auf dem laufenden erhalten werden; weil alle Gesellschaften mit internationalem Charakter (Pfadfinder, intern. Ferienkolonien usw.) ebenso wie alle, die an einer Annäherung der Völker mitarbeiten wollen, ein solch einfaches Mittel der Verständigung brauchen; weil mit einem Worte dieses Mittel, seinesgleichen zu verstehen, welchem Lande er auch immer angehören mag, für jeden zivilisierten Menschen nötig ist.

(Aus einem Aufrufe der Franz. Gesellschaft für Propaganda des Esperanto. Paris.)

Wie wirbt das italienische Ministerium für Propaganda?

Das Ministerium für die Presse und Propaganda in Rom benützt die internationale Hilfssprache Esperanto in verschiedenster Art, um Italien den Völkern anderer Länder näherzubringen:

1. Radio-Rom sendet jeden Samstag um 19 Uhr Touristenwerbung mit dem Ziele, Esperantisten und deren Freunde nach Italien zu bringen und die italienische Sprache vermittelst Esperanto populär zu machen.

2. Das Propaganda-Ministerium sendet kostenlos jedem, der darum ersucht, die Texte der gehaltenen Radio-Esperantovorträge.

3. Das Propaganda-Ministerium gibt heraus und versendet kostenlos prächtige Führer und Esperanto-Zeitschriften an jeden, die sie wünscht.

4. Das Propaganda-Ministerium gibt soeben ein prachtvolles Buch „Die vier Jahreszeiten in Italien“ in 25.000 Exemplaren in Esperanto zum kostenlosen Versand heraus.

5. Das Propaganda-Ministerium veranstaltet durch Radio-Rom Wettbewerbe unter den Radio-Esperantohörern und ver-

teilt Preise, die freie Reisen nach Italien und kostenlosen Aufenthalt daselbst beinhalten.

6. Solche Wettbewerbe fanden bereits drei statt, der vierte erfolgt in den nächsten Tagen.

Smetanas Oper „Der Kuß" im Rundfunk.

Diese Oper des bedeutendsten Repräsentanten tschechisch-nationaler Musik wurde am 7. Oktober von den tschechischen Radiosendern in Esperanto gesendet und von den Sendern in Lyon PTT und Kaunas sowie Klaipeda (Memel) übernommen.

Diese glänzende Idee des Senders Brünn, der Welt auch den Inhalt der Oper zu vermitteln, fand begeisterten Beifall bei den Esperantisten Europas.

Es gibt aber auch Radiostationen, die den Wert des Esperanto als Werbemittel für ihr Land noch nicht voll erfaßt haben!

Por kantado en grupvesperoj!

Lulila kanto.

(Wiegenlied.)

Gotter. Mozart.

Dormu knabeto, nur vi,
Ŝafoj kaj birdoj kun vi,
Arboj kaj floroj sen ton'
Ankaŭ abeloj sen son'.
Luno kun blanka ekbril'
Sendas salutojn ja mil.
Luno, ĝi gardas je vi.
Dormu knabeto, nur vi!
Ekdormu vi!

Kiu pli riĉa ol vi?
Ĉiam plezuroj por vi.
Suker', belega ludil',
Ankaŭ ĉevalveturil'.
Ĉio do preta, en ord',
Ĉio nur estas akord'.
Kio ja restos por vi?
Dormu, knabeto, nur vi!
Ekdormu vi!

Trad. Fritz Stengel.

En la venontaj numeroj ni ĉiam publikigos „Por la lernanto!"

Internacia Esperanto-Ligo
ĉefdel. G. Weber, Wien, I., Neue Burg.

La suplemento al la jarlibro jam aperis!

Novaj delegitoj?

Hainfeld, N.-Oe.: Fr. Wandl, instruisto
Kirchberg i. Tirol: J. Kaps, katolika pastro.

Aŭstria Esperanto-Asocio
Reg.-Rat Fritz Stengel
Wien, XVII., Syringg. 3.

Propagandaj semajnoj.

Ni esperas, ke ĉiu faris sian devon; tamen neniu kredu, ke nun estas tempo por ripozi: obstine ni daŭrigu nian laboron kaj senlace ni varbu plu por nia afero.

Kursoj.

Ni atendas raportojn pri aranĝo de kursoj. Kie tiaj ne povis esti ankoraŭ aranĝataj aŭ kie la klopodoj estis vanaj: sur aliaj vojoj, per aliaj rimedoj ni laboru. La vintro estas longa, ankoraŭ estas tempo.

2. Sprache.

Ni disponas ankoraŭ pri fikse mendita, sed ne elĉerpita kvanto da abonoj de „2. Sprache", kiu signifas „mortan kapitalon". La gemembroj estas petataj abonigi la gazeton (devigabonoj por kursanoj laŭ indikoj de la propaganda cirkulero) kaj sendi al **ni** la mendojn. Abono estas komencebla ĉiumonate.

Uzu niajn servojn.

AEA instalis aron da servoj por siaj membroj. Uzu ilin: Skribu sur nia belega esperantista **leterpapero,** sur niaj **poŝtkartoj:** disdonu la **flugfoliojn** de RoKo, pendigu la grandajn (stel-tero) kaj malgrandajn (kursinvit-) **afiŝojn,** mendu per ni favorpreze **stelojn** kaj **stampilojn,** mendu la bonprezajn **propagandajn tabulojn** kaj postulu la **IEL-mondkarton** por ekspoziciaj celoj.

Libroservo.

AEA estas preta, havigi al la membroj ĉiajn esperantistajn kaj neesperantistajn librojn originalpreze. Ni disponas ankoraŭ pri kvanto da „ŝlosiloj" kaj vortaretoj germane-esp. (prezo po 10 g.)

Al ĉiuj grupestroj!

Die Leitung ließ für Werbezwecke und für bestimmte Anlässe der Ortsgruppen Besuchskarten mit Aufdruck für alle AEA-Gruppen herstellen. Wir wollen so zu einer einheitlichen Organisation beitragen. Die Karten mit dem Aufdruck der betreffenden Gruppe gehen allen Gruppenleitern zu. Die Kosten der Herstellung dieses vornehmen Werbemateriales, das, wie bekannt, von R. K. herausgebracht wurde, hat die Leitung des Bundes über-

nommen. Dennoch müssen wir die Gruppen ersuchen, uns einen Beitrag der Herstellungskosten zu vergüten. Wir denken, je nach Anzahl der Gruppenmitglieder, an S 1.— bis S 1.50.

Eŭkaristia Mondkongreso.

En kelkaj monatoj okazos en Budapest la 34-a Eŭkaristia mondkongreso. Esperanto estas akceptita de la Prepara Komitato de la kongreso kiel helplingvo.

Tial R. K. sendis koncernan leteron al Heroldo, en tiu estas invitita la tutmonda Esperantistaro, viziti la kongreson. La leteron subskribis Reg.-R. Stengel kiel prezidanto de R. K. kaj L. Chiba, la estro de la katolika grupo.

Detalojn pri veturado al la grava kongreso de Vieno al Budapest por la Aŭstriaj grupoj sekvos.

E.-Renkontiĝo en Gmunden.

La renkontiĝo de la supraaŭstriaj grupoj de A. E. A. kaj A. E. F. estis plena sukceso. Harmonia kunlaboro inter A. E. A. kaj A. E. F. ĝojigis ĉiujn partoprenantojn. Ankaŭ ni ĝojas kaj dankas al ĉiuj, kiuj ebligis la sinceran kunlaboron kaj kiuj efektivigis la programon en vere esperantista senco.

Grupo Gaswerk-Wien.

Ni lastfoje raportis, ke grupo Gaswerk sub la gvido de insp. Schlerka aliĝis al A. E. A. Kompreneble la grupo ankaŭ samtempe restas en la kadro de „Nova Vivo".

Aŭstria Esperanto-Instituto.

La instituto aranĝos ĉe sufiĉa nombro de partoprenantoj:

1. Preparan kurson por ŝtataj ekzamenoj printempaj. La kurso plifaciligu la studadon de la ekzercmaterialo por la ekzameno, krome ĝi ebligu pli profundan trastudadon de nia lingvo.

2. Ĉe-kurson por progresintoj. Ĝin gvidos s-ro Insp. Jüptner (Vöslau).

La kursoj okazu meze de Novembro. Tial tuja anonco estas necesa al la adreso de la instituto: Wien, XVIII., Escherichgasse 5. Posemajne duhora instruo. Kurskotizo: § 2.50, senlaboruloj § 1.50 pomonate.

Anoncu vin per duobla poŝtkarto.

Salzburg. E-Grupo. La 13. X. estis varbvespero, la 18. komenciĝis kurso, kiun mi gvidas, ĉar prof. Christanell gvidas 3 kursojn en Borromäum. Nia estraro decidis la re-aliĝon al AEA. Meze de decembro SEG festos la 50-jaran jubileon de E. Invitoj sekvos. Dum la somero s-ano instr. Fötinger tre fervore propagandis en la ĉi-tiea gazetaro. Flugfolioj estis aldonataj al la instruistaj gazetoj. En aŭg. vizitis nin f-ino Tojoda el Tokio, la 20. okt. itala samideanino. f. Scheierl, sekr.

50-jara jubileo de E. en Supra Aŭstrio.

„Salzkammergut-Zeitung, Gmunden", en longa artikolo pritraktas ĉi tiun kuneston de la esperantistoj en hotelo „Goldenes Schiff", kiu brilis en la ornamo de la E.-insigno kaj kiu estas la restadejo por la Esperanto-Somerrestadejo Aŭstria.

El la grupoj en Linz, Wels, Salzburg, Vöcklabruck, Ebensee ili estis venintaj. La estro de la grupo Gmunden privatinstr. Holzleithner faris en ege flua maniero la festparoladon. La 12-jara Kuglerino renkontis grandan simpation; la patrino, s-ino Kugler el Linz lingve perfekte recitis poemojn de Zamenhof. Salutpoemon parolis membro el Vöcklabruck. La lastan paroladon faris dir. Wannek el Linz. La interligajn vortojn parolis s-ro Karl Franz el Wels. Miksita ĥoro el Wels, dueto Burlaki kaj akompanado de la komune kantitaj kantoj per violono kaj piano igis la atmosferon vere amuza kaj Esperanta. St.

Wien. E.-Soc. „Danubio" translokiĝis al Wiener Lehrerhausverein, VIII., Josefsgasse 12, 3-a ŝtuparo, teretaĝo kaj kunvenas ĉiam kiel ĝis nun lunde de 19.15 h. Gastoj bonvenaj.

Wien. E.-Soc. „Danubio" aranĝis la 4. okt. solenan kunvenon honore la gesanojn, kiuj estis ricevintaj la „Jubilean Stelon". Prezidis kort. kons. d-ro Heeber, kiu per koraj vortoj dankis al la distingitoj pro iliaj penadoj kaj laboroj kaj asistita de la sekretario s-ano Vasta li transdonis la „oran" al stud. kons. prof. Simon kaj la „arĝentan" al la societfondintoj dir. R. Kaftan kaj O. Popper, krome al la longjara societestro R. Čech kaj al A. Deistler, d-ro A. Engländer, Carla Jacobsen, prof. d-ro Jokl, Hedwig Kaes, M. Lackenbacher, d-ro E. Pfeffer, Emma Raff, dir. Fr. Jos. Schade, prof. d-ro H. Sirk, prokur. O. Zimmermann kaj al la societo mem. Nome de la distingitoj parolis dir. Kaftan, la festparoladon germanlingve faris stud. kons. Simon kaj E.-lingve prof. d-ro Jokl. En la nomo de la aŭstria s-anaro gratulis reg. kons. Stengl, prez. de RK. Prez. kort. kons. d-ro Heeber dankis al la neĉeestinta kort. kons. Steiner pro lia komplezo, alporti la J. St. kaj la diplomojn el Varsovio. — La poemon „La Vojo" recitis germane f-ino Liesl Frey, la originalan tekston A. Denks. Nome de la soc. dankis la estro Rajm. Čech, ĝojante pri la multaj pruvoj de amika simpatio flanke

de la Viena s-anaro. La kunsido estis enkondukita per ludo de solena marŝo, komponita de E. Munkascy kaj ludita de la komponisto kaj de d-ro Fritz Steiner. Pli ol 80 personoj ĉeestis. Per kanto de la himno kaj fotografado finiĝis la festkunsido.

Wien: Katolika Unuiĝo Esperantista kunvenas merkredo I., Stephanspl. 3, 2. et. de 18 ĝis 20 h en la ejo de Katolika Junularo sub gvidado de s-ano Gasparini kaj prezentas interesan programon. La monata Diservo okazis la 17. okt. La sanktan meson celebris kaj predikis honorprez. P. F. Meŝtan, atentigante i. a. pri la rozario kaj memorigante pri la 25-a jubileo de KUE en Aŭstrio.

La Di-servo en novembro okazos la 21. je la 10 h en Kathol. Gesellenverein, Wien, VI., Gumpendorferstr. 39. La estraro invitas vin. Adreso de la prez.: L. Chiba, IV., Schaumburgergasse 6.

Wien. Esperanto-Klubo. La **ĝeneralkunveno,** okazinta la 26. de oktobro, elektis jenan estraron:

prez. kortega kons Hugo Steiner
vicprez. efektiva kort. kons. Oskar Bastl
vicprez. Adolfine Felzmann
kasistoj: Alice Falk, Paul Plischke
sekret.: Elfriede Hojtasch, Adolf Peterlik
revizoroj: Artur Schidloff, Betty Schober.

En la **Komitaton por programaranĝo:** la s-inoj Eigner, Goloversnik, Russmayr, Umschaden. Wratny kaj la s-roj d-ro Maier, Neumann, reg. kons. Stengel kaj Zipfel.

Nome de la elektitoj prez. Steiner promesas fervoran laboron pro la bono de la Klubo.

La havajo de la Klubo estas S 167.85, la nombro de la membroj 91. Du novaj aliĝis. La revizoroj Schidloff kaj Schober raportas pri preciza kaj enorda tenado de la libroj.

Programo:

9. de novembro:

Prez. **Steiner** „Novajoj el Esperantujo"
S-ino **Kolarik** „Du belaj libertempotagoj"
Eduard **Weber** „Historieto"
Laŭtlegado el romano „Idoj de Orfeo"
Komuna Kantado.

16. de novembro:

5-a jara klubjubileo.
Festparolado: Prez. kort, kons. Steiner
Salutvortoj: AEA-prezidanto reg. kons. Stengel
„Vespero ĉe Adam Zamenhof": Elfriede Hojtasch
Humoro: Alexander Neumann
Humora duo: Knapp kaj Plischke
Kantoj al la liuto: Aug. Schlerka
kaj aliaj surprizoj.

23. de novembro:

Prez. Steiner „Novajoj el Esperantujo"
Hans Zipfel „Bonhumoraj poemoj"
Betty Schober „La ĝusta metodo"
d-ro Emil Pfeffer „La strukturo de E. en la spegulo de l'kompara lingvistiko"
„Lautlegado el romano" „La idoj de Orfeo"
Kantado kaj ludado.

30. de novembro:

Prez. Steiner „Novajoj el Esperantujo"
Efektiva kort. kons. vicprez. O. Bastl „El mia profesia vivo"
Elfriede Hojtasch „Rakontado"
Laŭtlegado el romano „Idoj de Orfeo"
Kantado kaj ludado.

7. de decembro:

Festvespero de Sa. Nikolao.

21. de decembro:

Intima Kristnaskofesto.

Atentu!

Esperanto-Klubo ne aranĝos **Zamenhoffeston,** ĉar tion por nia urbo aranĝos **RK.** Mi jam nun petas vin, **ke vi ĉiuj,** membroj de nia klubo, partoprenu en ĉi tiu festo de RK. Ni montru, ke en nia klubo regas vera Zamenhofa sento kaj la kompreno, ke Esperanto nur venkos per la kunlaboro de ĉiuj.

Via Steiner.

*

En lasta tempo nia klubo havis diversajn vizitojn de eksterlandanoj kaj aŭstrianoj. La 12. okt. parolis en nia klubo tre interese pri la „Societa situacio de la virino en Japanujo" univ. prof. d-ro Yagi el Kioto.

Schriftlicher Esperanto-Kurs für alle jene, die nicht Gelegenheit haben, an einem mündlichen Kurse teilzunehmen. In 20 Wochenbriefen wird der Neuling in das Wesen der Sprache eingeführt. Preis des ganzen Kurses S 2.60. Der 3. Brief ist bereits erschienen und der Kurs wird gut in Anspruch genommen. Neuhinzutretende erhalten diese 3 Briefe auf einmal geliefert.

Eigentümer, Herausgeber, Verleger, verantwortl. Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 154. — Druck: „Albrecht Dürer", Ges. m. b. H., Wien, VII., Bandgasse 28.